

Gerda Illerhues,

Envintre

tradukita de Manfred Retzlaff

El arbar' nebulo rampas,
frostmalvarma estas ĝi.
Treme en la akra vento
svelta fleksas sin abi'.

Pluvo kiel larmoj falas
el la griza nubmalhel',
kaj fantome minacanta
estas supre la ĉiel'.

Vintrotagoj nin revigas
pri printempo kaj somer'.
Sed ankoraŭ daŭros longe,
ĝis revenos primaver'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Winter" de GERDA ILLERHUES (*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2000-02-28.*

MR-218-1a / Arg-769-1542 (2013-01-12 08:33:43)

*Verkis: Ilerhus', Gerdino. (Gerda Illerhues * 1930; Lehmburgstr. 50, D-46282 Dorsten, Tel. (02362) 2 27 62)*